# EKO 2026

**Gvatemalo**
**Latvio por BET 50**
**Afrika Lomeo**

EKO 2026-4 feb 5

## Gvatemalo en HPK

Inter la 123 membroj de la *Honora Patrona Komitato por la Zamenhof-Jaro* [ en 1959 ] , estis la jenaj Gvatemalanoj :

- D-ro Carlos Martínez DURÁN, **Rekt. de la Nacia Universitato** de Gvatemalo;
- Lic. José Mata GAVIDIA, Dekano de la Fakultato pri Sociaj Studoj,
- Kolonelo Marco Aurelio MÉRIDA, Ministro de Publika Edukado ;
- Lic. Jesus Unda Murillo, Ministro de Eksterlandaj Aferoj ;
- Lic. Adolfo Molina ORANTES, Direktoro de la Nacia Komisiono de Unesko, Gvatemalo.

Sendis Christian Lavarenne

## Riga gastigos la sesdekajn Baltiajn Tagojn

Latvia Esperanto-Asocio invitas Vin esti partoprenantoj de la 60-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-60) – la plej popularan Esperanto-aranĝon en Baltiaj landoj, okazontan de la 4a ĝis la 11a de julio 2026 en Rigo – la ĉefurbo de Latvio.
En la programo okazas diversnivelaj Esperanto-kursoj, Somera Universitato, vasta kultura programo, duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj, kvizoj, kantoj, dancoj k. a. aranĝoj. Kadre de la Tutmonda Ekzamentago 2026 de UEA la 11an de julio dum BET okazos skriba KER-ekzameno.
Jen ligilo, por pliaj informoi kaj la retan aliĝilon: www.esperanto.de/eo/bet

## Lomea kunveneto

Ĉi-decembre, ni estis nur ses personoj enj la kunveno. Ni faris vortludojn, interŝanĝis niajn diversajn vidpunktojn post kunlegado de interesa teksto de Ahmed Aslafy, kaj ĝuis ankaŭ prezentaĵon pri la temo ;Korespondado» post la tradicia kunmanĝo;. La etoso estis bonega. Ne gravas ĉu nur grupeto ĉeestis – pluvo malhelpis kelkajn aliajn – dankon al ĉiuj pro esti membroj aŭ subtenantoj de la grupo de Lomeo.

Sendis Christian Lavarenne

## Afrika bulteno preta

Bonvolu malkovri la voĉojn de Afriko per la 53a nova numero de la periodaĵo *Esperanto en Afriko* ĉe https://www.esperanto-afriko.org/download/esperanto-en-afriko-n-ro-53/ ! Elŝutu ĝin senpage kaj partoprenu la vojaĝon tra la plej freŝaj novaĵoj, raportoj kaj opinioj pri la afrika Esperanto-movado.

## Jen parta enhavo de IPR; nia pedagogia revuo


P. 2 Kolofono kaj P. 2 Vortoj de la redaktoro
P. 3 Nova alvoko: konkurso por subvenciotaj projektoj en Afriko
P. 4 Afrika rendevuao en Togolando: Kpalime gastigos la 9-an AKE jarfine 2026
P. 5 De Samarkando al la mondo: internacia UEA-delegacio pledis por Esperanto
P. 6 Afrika Komisiono renoviĝis per novaj membroj, novaj respondecoj
P. 7 Afriko moviĝas: esenco de la Afrika Agado de UEA
P. 8 La redakcio intervjuis Ranja Lydie Zafinifotsy
P. 10 Kantoj, skeĉoj kaj kvizo: Zamenhoffesto en IZo
P. 10 Togolando kulture, nova verko de Kokou
P. 11 De Kotonuo al Portonovo ĝis Granda-Popo: ekskursoj en Benino
P. 13 Studvojaĝo al Nagbeto kaj Aklowa: malkovro de naturaj mirindaĵoj de Togolando
p. 14 De Brno al Lomeo, Esperanto kunigas kaj inspiras


## En UEA facila – pri ĉina poeto

https://uea.facila.org/artikoloj/literaturo/bai-juyi-granda-poeto-de-%C4%89inio-r507/

Sendis: Alessandra Madella

## Honoritoj en 2025

En la “popola voĉdonado”, en kiu partoprenis kvarcent personoj, la 29-jara malagasa instruistino kaj esperantistino Ranja Zafinifotsy ricevis 114 voĉojn kaj iĝis la Esperantisto de la Jaro 2025. Ŝin sekvas du brazilaj esperantistoj: Rafael Henrique Zerbetto (111 voĉoj) kaj Fernando Maia Jr. (94 voĉoj).

Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2026/02/jaro-11/

## Benina informado

La 25an de oktobro 2025, Asocio de Beninaj Esperantistoj organizis

informkunvenon pri la internacia lingvo Esperanto por junuloj kaj plenkreskuloj el diversaj organizoj, asocioj kaj universitataj medioj.

La agado okazis en afabla kaj partopreniga etoso, kiu favoris interŝanĝojn kaj vekis scivolemon pri ĉi tiu internacia lingvo.

## La 8an de marto oni celebras la Tagon de Virinoj

Por memori la verkiston kaj filmiston Roman Dobrzynski ni (la Komisiono pri Virina Agado de UEA) planas montri la filmon URSULA, kiu prezentas la vivon de tiu ekzemplodona esperantistino Ursula Grattapaglia.

Sekvos filmo pri la genezo de tiu projekto kun Wera Blanke kaj Malgosia Komarnicka kaj filmo kun Ursula mem.

Internacia Tago de la VIRINOJ | Eventa Servo

https://eventaservo.org/e/5742f0

Sendis: Mirejo Grosjean

## Seminario de la itala instituto

Torina Esperanto-Centro, Torina Katedro de Esperanto kaj Itala Instituto de Esperanto invitas vin partopreni en la seminario, kiu okazos en Torino de la 27a de februaro ĝis la 1a de marto 2026. Eblas aliĝi ĉe la sekva ligilo:

https://forms.gle/eWUK2ocRiULfLn1C7 Por informoj skribu al istitutoitalianoesperanto@gmail.com

aura Brazzabeni, direhtoro,  IIE

SMG ŝanĝis la maneron indiki datojn [er forigo de la malnecesan ligostrekon.

Kunlaborantoj: Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)kaj Perlo Miela (HU)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Kvardek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.